


La Krokodil'

Informilo de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo



n°56
novembro
2009

EN ĈI TIU NUMERO:

LA DUA VESPERO DE YOLANDRA KAJ NORBERTO	1
UN VÉLO ESPÉRANTISTE SUR LE CAPITOLE	2
POR LA OKCITANA LINGVO!	2
L'AGENDA DU CROCODILE	3
NI KANTOS LA CANTO GENERAL	4
NIA VOJAĜO EN BRAZILO	4

La dua vespero de Yolandra kaj Norberto



La dua vespero de Yoandra kaj Norberto, niaj du kubaj invititoj, okazis en Belcastel, en Tarn. Ni estis dek sep ĉirkaŭ la tablo, niaj du amikoj, kvar esperantistoj de Tuluzo kaj anoj de la grupo de Lavour. Ĉiu el ni estis alportinta kelkajn specialaĵojn (fungojn, kolbason, salatojn ktp...). Yoandra miris pri la aŭtunaj fruktoj, ĉefe pri la vinberoj, la pomoj kaj la piroj, kiuj ŝajnis al ŝi veraj eksterordinaraĵoj!

Brulis fajro en la kameno. Feliĉe, ĉar yoandra ne bone eltenis la eŭropan malvarmon. Ŝi restis la tutan vesperon apud la fajrejo.

Pluraj ĉeestantoj estis vizitintaj Kubon, interalie Sylvie, de Lavour, kiu vivis tie plurajn jarojn. Ĝi

ne estis speciale organizita renkontiĝo, sed pli ĝuste agrabla vespermanĝa babilado. Niaj kubaj amikoj estis forlasontaj Tuluzon la sekvantan tagon al Béziers. Bonan finon de vojaĝo!

Verkis LA GRUPO DE LAVOUR

Vizitu nian blogon "La Krokodil'"

<http://lakrokodil.wordpress.com/>

Vi trovos tie la artikolojn antaŭ ilia apero en la papera versio. Vi povos ankaŭ kontribui sendante tekstojn, fotojn, aŭ komentante la jamajn artikolojn!

Un vélo espérantiste sur le Capitole

L'après-midi du 28 septembre, de drôles de machines se sont rassemblées place du Capitole... Des vélos couchés, appelés aussi vélocars, vélos horizontaux, bents ou kušbicikloj... Il était même possible d'en essayer certains, et quelques passants se sont lancés courageusement au milieu de la foule.

Parmi les sympathiques propriétaires de ces machines, Mathieu, toulousain qui réalisa en tour du monde en vélo couché, et Marc qui fait partie d'une petite entreprise écolo, alia ciklo*, basée à Oloron-Ste-Marie et qui fabrique et vend ...des vélos couchés.

Un des ses buts est de privilégier une construction la plus locale possible, à chaque fois que c'est possible, en utilisant des matériaux "écologiques". Un autre vélo et une autre façon de le construire ! Une démarche sympathique et pas aisée, à l'heure où la plupart de nos vélos ou pièces de vélos sont fabriquées en Asie sans aucun souci environnemental.

Alia ciklo, c'est un nom qui parlera forcément à tous ceux qui connaissent l'espéranto, et ce n'est pas un hasard. Deux des trois partenaires sont espérantistes et ils font la promotion de la langue internationale non seulement dans le nom de leur entreprise mais aussi sur son site et dans ses

plaquettes de présentations (bilingues français /espéranto).

Cherchez le point vert ! C'est l'alia unu (le premier prototype commercialisé) !

J'ai pu essayer la bête lors de 2 tours de place du Capitole, les sensations sont différentes par rapport à un vélo "classique" mais on se fait vite à la nouvelle position, bien plus confortable. Bon j'ai encore à travailler l'atterrissage mais j'espère avoir l'occasion bientôt de faire d'autres essais.

Quand à Sébastien, un des nouveaux membres d'EKC, il paraît qu'il a commandé un "alia unu" au père Noël !

Moi j'attendrai peut-être l'"alia du", celui avec les petites roues.

Le soir, Marc et Matthieu ont gentiment accepté de participer à notre émission Esperanto Magazino sur Canal Sud, si vous voulez en savoir plus sur leurs aventures, vous pouvez réécouter l'émission sur la page radio de notre site.

*Alia ciklo = un autre cycle, un autre vélo

Marion

Por la okcitana lingvo

Une trentaine d'espérantistes, venus de Toulouse, de la région, en force de Catalogne, de Lyon, et même de Belgique se sont joints samedi dernier à la manifestation "Anem Òc ! per la lenga occitana !" organisée à Carcassonne pour la langue occitane.

Le matin sur le village occitan, alors que des bus déversaient des milliers de manifestants venus de tous les coins d'Occitanie ou de Catalogne, nous avons tenu un petit stand de présentation de l'espéranto, avec quelques ouvrages bilingues occitan/espéranto.

Nous avons aussi distribué des centaines de fulhetons qui présentent en occitan l'intérêt de l'espéranto pour les langues minorisées et les



avantages de la langue internationale (merci à Farri pour le fulheton).

Les échanges autour du stand ont été très intéressants et la plupart des personnes nous a fait part de leur sympathie et de leur intérêt pour l'espéranto.

Ce sont ensuite près de 25000 personnes qui ont manifesté jusqu'aux remparts de la cité. Une vraie capitale (réussite) pour la mobilisation !

Le soir, un riche programme musical a clôturé la journée en chansons et en danses, en première partie de soirée sur le village occitan, en deuxième

au village voisin de Vilagalhenc.

Cette journée a été aussi l'occasion de rencontrer d'autres espérantistes catalans ou d'autres régions avec qui nous avons pu discuter de projets futurs pour renforcer notamment nos liens, et les liens entre l'espéranto et la langue et la culture d'oc.

Une journée riche et pleine de rencontres et de projets, alors ce n'est pas si grave si on est rentrés très tard et très fatigués...

Marion

L'AGENDA DU CROCO

Dans les cas où il n'est pas indiqué de contact, renseignez-vous auprès de Kiki : 06 31 68 00 26 / 05 61 62 39 48

NOVEMBRE - NOVEMBRE 2009

Mardi 10 novembre, 19h : Panorama actuel de l'espéranto, présentation publique

Lieu : l'ENSEEIH, près de Saint-Aubin

Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

Mardi 10 novembre, 19h30 : Conversation en espéranto

ATTENTION CHANGEMENT DE LIEU

Lieu : Café Le Papagayo, 31, rue Deville (proche fac de Droit)

Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.

Organisateur : Asso Bilingue

Samedi 14 novembre, de 10 à 17h : forum des associations de solidarité internationale - Stand

Dans le cadre de la Semaine de la Solidarité Internationale

Objectif : informer sur l'espéranto et notre association

Lieu: place du capitole

Mardi 17 novembre, 19h : début d'un 2ème cours express

Lieu : l'ENSEEIH

Objectifs : s'initier en 6 semaines à l'espéranto.

Contact : Marion 06 87 64 75 84

Jeudi 19 novembre, 19h30 : Assemblée générale annuelle d'EKC

Lieu : chez Kiki au 31, rue Franc à Toulouse

Samedi 21 et Dimanche 22 novembre un week-end de travail autour du Canto General

Lieu : Maison de quartier des Arènes-Romaines à Toulouse

Projet: Participation à l'association de chorale inter'kant

Objectif: Travail avec la chef de Choeur du projet Interkant Franjo, suite au travail de septembre et octobre

Contactez: Jeanne-Marie Cash : 05 61 25 55 77

Mardi 24 novembre, 19h30 : Conversation en espéranto

Lieu : Café Le Papagayo, 31, rue Deville

(Détails : voir plus haut)

DECEMBRE - DECEMBRE 2009

Jeudi 3 décembre, 20h : Soirée spéciale jeux au bâton à palabres

Lieu : Le bâton à palabres, 15 rue de Thionville (quartier Colombette, Péri)

Objectif : pratiquer la langue en jouant

Tarif : 2 euros, une boisson sans alcool offerte

Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

Mardi 15 décembre, 19h30 : Conversation en espéranto

Lieu : Café Le Papagayo, 31, rue Deville

(Détails : voir plus haut)

Dimanche 20 décembre : ZAMFESTO 2009

Horaires:

10h A.G. de la fédération Esperanto Midi-Pyrénées

A partir de 11h30 : Apéritif et repas

A partir de 14h30 : Foire des associations de la région

15h30 : Concert de FAMO (Fabrice Morandau)

Lieu: salle des cheminots à Toulouse 65, rue St Roch (Stade Henri Greard)

Ni kantos la CANTO GENERAL

Jam duan fojon semajfine kuniĝis deko da korusanoj, kiuj lernas la faman verkon « Canto General » de Pablo Neruda, la fama ĉilia poeto. Ĝin muzikigis Nikis Theodorakis, greko 84-jara. La verkon esperantigis Georges Lagrange, kaj simpligitan aranĝon kantos kvindeko da homoj dum la SAT-amikara kongreso en Saint-Brieuc, ĉe Pasko 2010.

Jacques Caubel gvidas la studadon en Midi-Pyrénées. La laboro malfacilas, ĉar la ritmoj de la muziko estas malregulaj. Multaj kantantoj venas al

Tuluzo de malproksime (Pau, Brive, Béziers). Krome dum la tuluza provludo la 25-an de oktobro venis kvar novaj korusaninoj. Ĉu ni sukcesos en tiu ĉi projekto ? « Eble », diras Jacques; « Certe, ĉar ĉiuj tre entuziasmas! », diras Jeannette.

Fine de novembro ni kunvenos denove en Tuluzo, kun Franjo LEVEQUE, kiu venos speciale de Bretonio por kantigi nin.

Jacques et Jeannette

Nia vojaĝo en Brazilo

Sandra kaj mi vizitis Brazilon dum la tuta aŭgusto. Kial rakonti ĝin ĉi tie? Mi havas tri bonajn kialojn...

Unue, Marion petis al mi, tiel ĝentile ke mi ne povis rifuzi. Due, mi finfine kaptis en Amazonio la estron de tiu blogo: la krokodilo (vidu la foton!). Trie, ni renkontis tre interesajn esperantistojn en Manaus dank'al Pasporta Servo: Ĥodrigo kaj Maria.

Ili estas tre eksterordinara paro: ŝi estas danino (ŝi estis en Manaus dum la ferioj), li estas brazilano, ambaŭ estas gestudentoj kaj ili interparolas nur esperante. Efektive, Maria ankoraŭ ne parolas la portugalan lingvon kaj Ĥodrigo ne parolas la danan, kaj ili pensas ke esperanto estas pli facila kaj efika ol la angla.

Ili gastigis nin kaj ni vizitis Manaus kun ili, parolante esperanton (Maria parolas ankaŭ la francan do ni aligatoris kelkfoje, sed ne diru al mia kaptito!). Ni travivis du agrablajn vesperojn kaj ni amikiĝis kun ili.

Tiu ekzemplo pruvas ke esperanto funkcias kaj povas fabriki amon kaj amikecon. Ankaŭ la

vojaĝresto estis tre interesita, ni renkontis tre simpatiajn gebrazilanojn, ni malkovris brazilan kulturon (gastronomio, muziko kaj futbalo!) en Rio de Janeiro, Foz de Iguacu, Salvador de Bahia, Sao Luis, kaj Fortaleza, sed ĝi ne rilatas al esperanto, do mia kaptito ordonis ke mi ne diru plu!

Samy kaj Sandra



ESPERANTO-KULTUR-CENTRO DE TULUZO
Centre Culturel Espéranto de Toulouse
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél. : 05 61 62 39 48 — 06 31 68 00 26
esperanto.toulouse@free.fr
<http://esperanto.toulouse.free.fr>